

Denis de Rougemont
Claude Gacond, 152-a radioprelego, 1966.08.31 & 1966.09.03

Cl.- Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Denis de Rougemont, svisa verkisto hodiaŭ bone konata en la medioj favoraj al eŭropa federacio, ĵus verkis libron pri Svislando, kiu titolas *La Suisse ou l'histoire d'un peuple heureux* [Svislando aŭ la historio de feliĉa popolo].

A.- En tiu libro Denis de Rougemont ne nur priskribas la historion de la svisa popolo. Li ankaŭ rakontas, kiel funkcias la svisa federacio, montras ĝian originalecon kaj esprimas la opinion, ke tiu federacia eksperimento povus helpi al la starigo de eŭropa federacio.

Cl.- Ni dediĉos serion da prelegoj al tiu temo : svisa federigo kaj la provoj federigi Eŭropon. Ni ne resumos la libron de Denis de Rougemont, sed libere inspiros nin el ĝi.

A.- Se oni demandas al svisoj la aĝon de ilia lando, oni ricevas du respondojn. Unuj pensas, ke Svislando naskiĝis en 1291, aliaj en 1848.

Cl.- Do por unuj Svislando estus sescent sepdek kvin jaraĝa, dum por aliaj Svislando nur estas cent dekok jara. Inter ambaŭ respondoj estas kvincent kvindek sep jaroj.

A.- La svisoj estas konataj kiel precizemuloj. Iliaj horloĝoj havas la reputacion indiki la tempon je milono de sekundo. Kaj subite, kiam temas pri la aĝo de la patrio, la svisoj fariĝas eble la plej malprecizaj en la tuta mondo : duonmiljaro de diferenco en iliaj kalkuloj. Strange, ĉu ne !

Cl.- La kaŭzo estas, ke la svisa federacio formiĝis subite en 1848 post decidiga krizo. Multaj svisoj, precipe franclingvaj, kalkulas sian apartenon al la svisa popolo nur ekde tiam.

A.- Antaŭe nur ekzistis Ligo de Ŝtatoj sen centra aŭtoritato. Tiu Ligo naskiĝis en la sangotarda regiono meze de la dektria jarcento. Ĝi grupigis tri landetojn nomataj Waldstätten [Arbaraj landoj]. Ili estas Uri, la valo, kie troviĝas la pasejo Gotardo, Schwyz, najbara valo, kiu poste donis sian nomon kaj flagon al la ligo : Schweiz, Svislando, ni vidos kial, kaj Unterwalden, paŝtejoj, kiuj ankaŭ tuŝis la komunan lagon hodiaŭ nomatan Vierwaldstättersee [lago de la kvar arbaraj ŝtatoj].

Cl.- Tiu arbara kaj paŝteja regiono ludis gravan rolon en la ekonomia vivo de la Sankta Imperio. Ĝi ligis la romajn ŝtatojn al la germanaj teritorioj. Ĝi estas alpa vojkruciĝo. Ĝi estas la plej rapida vojo inter la sudo kaj la nordo. Pro tio en 1231 la valo Uri ricevis la privilegion dependi nur rekte de la imperia krono. Tiun privilegion ricevis kutime nur urboj.

A.- Dum la interregado, kiu sekvas la morton de la lasta Hohenstaufen imperiestro Frederiko dua, la Arbaraj ŝtatoj Uri, Schwyz kaj Unterwalden eksperimentas civitanan memregadon, kaj pro tio ili devas rezisti al la intervenema premo de la najbara duka familio Habsburg.

Cl.- Fulmotondro ! La duko Habsburg elektiĝis imperiestro. Tion la arbaraj ŝtatanoj ne povis akcepti. Sekreta pakto redaktita en la latina sigelita en la komenco de aŭgusto 1291 fortikigas la traktatojn, kiuj jam ligis la tri arbarajn landetojn.

A.- Tiu pakto de 1291 restis longe sekreta. Pri ĝi raportas en 1315 la pakto de Brunnen post la batalo de Morgarten. Poste ĝi restos forgesita ĝis 1760, kiam bazela juristo nomata Gleser malkovras unu kopion en la arkivejo de Stans, ĝin tradukas germanen kaj ĝin publikigas tiel por la unua fojo.

Denis de Rougemont
Claude Gacond, 152-a radioprelego, 1966.08.31 & 1966.09.03

Cl.- Estas tiu dokumento malkovrita en 1760, kiu estas hodiaŭ ekspoziciita en la svisa nacia muzeo en Schwyz, kaj kiu estas konsiderata kiel la naskiĝa atesto de Svislando en la svisa folkloro.

A.- Ni vidis, ke estas la ŝtato Schwyz, kiu donis nomon kaj flagon al nia lando. Kial, kiel kaj kiam tio okazis ?

Cl.- Estas la batalo de Morgarten, kiu por la unua fojo malkaŝis la realan ekziston de la Ligo inter la arbaraj ŝtatoj. Ĝi estis eksterordinare mortiga por la imperiestro kaj okazis sur la teritorio de Schwyz kaj enscenigis strangajn soldatojn.

A.- Hodiaŭ la svisoj estas konsiderataj kiel paca popolo. Sed la prasvisoj estis alispecaj. La kampanoj de Schwyz ne ĉesis ataki la abatejon Einsiedeln, kies bienon kaj riĉaĵojn ili ĵaluzis. Dufoje pro tio kolektiva ekskomunikado ilin frapis. Sed sensukcese. Ili mokis pri tiu papa cerbumaĵo.

Cl.- Tiam la duko Habsburg Leopold rekrutas armeon kaj marŝas kontraŭ Schwyz. La 15-an de novembro 1315 kolono de dumil kirasitaj kavaliroj sekvata de multoma infanterio laŭiras la etan lagon Aegeri. La Schwyz-anoj ilin atendas sur la krutaĵo Morgarten je sia ŝtata limo. Subite la imperia kunirantaro estas haltigita. Lavango ŝtona kaj trunka falas sur ĝin dum teruraj krioj anoncas la alvenon de alpanoj. Iliaj ŝuoj havas ferajn krampojn, per kiuj ili povas kroĉiĝi en la deklivoj super la kavaliroj. Tiam per halebardoj, falĉiloj kaj hakiloj ili masakras la kavalirojn, dum la infanterio forkuras kun la duko Leopold.

A.- Tiama kronikisto, la monako Johano de Winterthur skribas : « *Ne estis batalo, sed kvazaŭ buĉado de la homoj de la duko Leopold.* »

Cl.- Tiuj teruraj Schwyz-anoj eksimbolis por la eŭropaj kampanoj venkokapablon de popolanoj super la nobelaro. De tiam la anoj de la arbaraj Ŝtatoj ricevis la nomon Schwyzer, Schweizer, Schwyz-ano, sviso, kaj la ruĝa flago kun blanka kruco, la simbolo de la landeto Schwyz estis konsiderata de la eksteruloj kiel simbolanta la tutan Ligon.

A.- En Eŭropo oni do komencis paroli pri la svisoj ekde 1315 pro ilia venko de Morgarten super la duko Leopold. Sed por ke ĉiuj svisoj akceptu sian svisecon, oni devos atendi ĝis 1848. Pro tio la svisoj ne ankoraŭ povis interkonsenti pri la reala aĝo de sia lando.

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-